

SOLENA VESPERO HONORE AL LA DATREVENO DE LA NASKIĜTAGO DE  
LA MAJSTRO

okazos la 12-an de decembro 1956 en la granda salono de Malá scéna en Praha II., Ve Smečkách 26 je la 19,30 –a horo.

Verda Ĉaro de Julio Baghy dum la vespero de la originalaj esperantaj teatraĵoj prezentos al vi:

Marjorie Bouton: „Ĉe l'akvo de forgeso“ /dramato en versoj, ricevis pasintjare la unuan premion dum „Belarta konkurso“./

Julio Baghy: „Dum tronbras kanonoj“ /lasta laboro de Julio Baghy, verkita por la Verda Ĉaro de Julio Baghy kaj dediĉita al ĝia gvidantino Eva Seemannová./

Venigu viajn gastojn! Prizorgu la enirbiletojn en la antaŭvendo ĉe Malá scéna /telefono 24 90 61/, krom lunde, ĉiutage de la 16-a ĝis 20-a horo.

-----

L. L. ZAMENHOF

/Okaze de la datreveno de lia naskiĝtago/

Neniu supozas, kaj Zamenhof mem ne supozis, ke komuna lingvo per si mem forigos ĉiujn malkonsentojn kaj miskomprenojn inter la homoj: „ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj“, li skribis: tamen ĉiu saĝa homo, kiu mem havas sperte, eĉ tre modestan, pri la internaciaj rilatoj, scias tre certe, ke komuna lingvo estas nemalhavebla kondiĉo por interhoma kompreniĝo kaj kunvivado.

Homoj, kiuj ne havas komunan lingvon, tro volonte kaj eĉ senintence rimarkas unuavice la diferencojn inter si, kiuj pro nekomprene ekludas tro elstaran roon en la homaj rilatoj. Kaj la diferencoj inter la homoj, nacioj kaj rasoj estas ĉiam duagrada; ili estas diferencoj de haŭtkoloro, de kutimoj kaj moroj; diferencoj de vestaĵoj, de kiurado, de arĥitekturo, de ĝentilecoformoj – unuvorte, de tute supraĵaj aferoj, kiuj preskaŭ ne tuŝas la kernon kaj esencan homecon de la homoj. Oni rimarkas ke en la kadro de tiu aŭ alia nacio homoj kun tute malsimilaj religiaj kredoj aŭ politikaj opinioj sukcesas kunvivi pli-malpli pace kaj harmonie: ĉar la komuna nacia lingvo ebligas tion a lili. Kompreneble, ankaŭ en la kadro de nacio la komuna nacia lingvo per si mem ne solvas la problemojn, sed ĝi faciligas la solvon dum adekvataj internaciaj problemoj frontas la lingvajn obstaklojn.

La esperantistoj spertis kaj pruvis, ke homoj de la plej diversaj nacioj, kun la plej diversaj kredoj, povas kunlabori kaj kunveni sur neŭtrala bazo, en reciproka tolero, ĉar komuna internacia lingvo tion ebligas al ili. Interparolante sian komunan lingvon, la esperantistoj penetras preter la tute supraĵajn interhomajn diferencojn, kaj atingas la komunan homecon de la alinaciaj homoj. Ĉar ilia lingvo estas neŭtrala kaj regula, la esperantistoj interparolas sur bazo de plena lingva egaleco; neniu sentigas per sia misa prononcado aŭ kripligita stilo tiun „fremdecon“, kiun apenaŭ povas eviti fremda parolanto de nacilingvo, kiel ajn sperta, kaj kiu nepre forpelas la naturecon de la konversacio, por ne paroli pri la eraroj, miskomprenoj kaj, ne malofte, veraj kompleksoj de inferioreco.

La homoj deziras interkompreniĝi. Sed eĉ tiuj, relative malmultaj, kiuj studadis fremdan lingvon en la lernejo aŭ ekster ĝi, trovas en la praktiko, ke per fremda nacilingvo aŭ eĉ per pluraj tiaj lingvoj, la lingvaj bariloj ne estas rompitaĵoj. Tial ĉiam pli granda nombro de personoj turnas sin kun realisma entuziasmo al la Internacia Lingvo, genia kreaĵo de L. L. Zamenhof, kaj trovas, ke ĝi perfekte plenumas la rolon al kiu ĝi estis de la komenco destinita: la rolon de komprenilo internacia. Ĝi malfermas por ili la pordojn de la mondo. Ili tuj povas senpere kontakti kun homoj de ĉiuj nacioj; interhomaj diferencoj ekhavas sian ĝustan proporcion; la esenca Homo triumfe trabilas. La 15-a de decembro, la tago de naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof, estas solene festata en centoj da Esperanto-societoj kaj grupo jen ĉiuj anguloj de la mondo. Sed ĝi ĉiam pli fariĝas memoranda festotago ankaŭ por ĉiuj aliaj, kiuj sincere sopiras rektan, senperan interancian kompreniĝon de la homoj: de ĉiuj homoj, eĉ de la plej simplaj kaj humilaj.

Stratoj kaj placoj en centoj da urboj jam portas la nomon de D-ro Zamenhof. Honore al lia genio estas starigitaj jam pluraj brilaj monumentoj. Sed la plej brilan Zamenhof starigis al si mem per sia tuthoma lingvo. Kaj se pri ies verko oni prave povas diri, ke ĝi vivas eĉ post la morto de ĝia aŭtoro, tiam certe tio estas vera por la majstra kreaĵo de Zamenhof: ĝi transformiĝis en vivantan nuancoplenan esprimilon de pensado kaj sentado vaste uzata ĉiutage por ĉio, por kio lingvo servas al la homo.

Dro Ivo Lapenna

-----

INFORMA FAKO DE UEA: Ni petas vin traduki la ĉi-supran artikolon en vian nacian lingvon kaj publikigi en kiom eble plej multe da gazetoj kaj revuoj. Vi povas artikolon longigi aŭ mallongigi, adapti ĝin al la landaj cirkonstancoj aŭ al la karaktero de la revuo, en kiu vi intencas ĝin publikigi /komprenoble sen la nomo de Dro I.Lapenna/. Laŭ via bontrovo vi povas ankaŭ verki tute novan artikolon. La ĉefa afero estas, ke okaze de la datreveno aperu artikoloj aŭ almenaŭ mallongaj informoj en kiom eble plej multe da gazetoj kaj revuoj.

Estus, tre utile, ke la Zamenhof-tago ĉi-jare estu festata kiel eble plej solene. Estus necese, ke la grupoj faru altnivelajn aranĝojn en kiel eble plej belaj salonoj kun prelegeto, legado el la verkoj de Zamenhof, muziko. Al la aranĝoj – se ili vere estas bone preparitaj kaj se laŭ la enhavo ili fakte estos dignaj de la genio de Zamenhof – la grupoj kaj societoj invitu ankaŭ neesperantistojn.

La ĉi-jara Zamenhof-tago estu kuraĝiga kaj inspira por la esperantistoj, alloga por la neesperantistoj!

-----

ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenas ĉiumerkrede en Praha II., Ve Smečkách 26, je la 20-a horo.  
JUNULARO de la Klubo kunvenas ĉiumarde en Praha II., Krakovská 21., III-a etaĝo, je la 19-a horo.

Programo:

- 5.12. Jaroslav Šustr: Ĉu nia Bulteno estas legata en eksterlando?
- 12.12. SOLENA VESPERO DE VERDA ĈARO DE JULIO BAGHY OKAZE DE LA NASKIĜTAGO DE L.L. ZAMENHOF
- 19.12. Vladimír Kočvara /Rokycany/: Universo ĉirkaŭ ni.
- 26.12. Dua Kristnaska festotago. ESCEPTE NE OKAZAS LA KUNVENO!
- 2.1. Ni diskutas pri la novjaraj planoj kaj laboruj. Libera tribuno de la klubanoj.

LA ESTRARO DE NIA KLUBO DEZIRAS AL LA KLUBANARO, AL LA AMIKOJ ENLANDE KAJ EN LA TUTA MONDO AGRABLAN TRAVIVON DE BELAJ KRISTNASKAJ TAGOJ, PROSPERAN NOVJARON 1957 KAJ DAŬRAN PACON AL LA SUFERANTA HOMARO!

---

Z ÚSTAVU LINGVISTIKY PŘI AKADEMII VĚD SSSR.

Dne 24. ledna t. r. byla na zasedání sekce všeobecného, srovnávacího a historického jazykozpytu vědecké rady ústavu na doporučení byra oddělení literatury a jazyka vyslechnuta a zhodnocena přednáška doktora filologických věd E. A. Bokareva na thema „Současný stav problému mezinárodního pomocného jazyka“.

Kterýkoliv vědecký pracovník, jenž bádá v některém vědním oboru, nemůže a nesmí se v naší době omezovat jen na literaturu ve svém mateřském jazyku. Je nevyhnutelně nucen obracet se k odborné literatuře vycházející v různých řečích – rusky, anglicky, francouzsky, německy, čínsky, španělsky, japonsky, arabsky a v mn. j. S tím souvisí i problém jak organizovat systematické překládání z jednoho jazyka do desítek ostatních /a naopak/ ohromného množství vědecké literatury, což nijak neosvobozuje vědce od nutnosti ovládnout aspoň několik cizích jazyků. Již dlouho se hledají způsoby a činí se pokusy nějak překonat řadu nevýhod vyplývajících z existujícího faktického polyglotismu. Jak ukázal řečník, tato otázka se dotýká nejen zájmových styků mezi vědci, ale v mnohem širším měřítku i rozvoje mezinárodních styků a tím nabývá nejen vědeckého, kulturního a hospodářského významu, ale též určitého významu politického. Navrhuje se přijmout za hlavní jazyk pro mezinárodní styky některý z existujících již jazyků. Značné množství literatury je např. věnováno propagaci angličtiny jako světového jazyka, dokonce byl vytvořen zvláštní systém „ulehčeného“ jazyka „Basic English“. Řada prací doporučuje tzv. teorii anglofrancouzské dvojjazyčnosti atd. Není pochyby o tom, že snahy vnutit násilím některý z vyspělých národních jazyků všem národům na světě jsou naprosto beznadějně. Nemají nic společného s marx-leninským chápáním národního rozvoje, a tudíž musí být zavrženy jako odsouzené k neúspěchu.

Mnohokrát se děly pokusy vzkřísit jako pomocný mezinárodní jazyk latinu a nějak ji pro tento účel reformovat. V posledních deseti letech se takové projekty /např. „Latino sine flexione“/ propagují značně slaběji než před druhou světovou válkou.

Největší zájem však budí jiný způsob řešení tohoto problému, totiž vytvoření zvláštního umělého jazyka jako pomocného prostředku pro mezinárodní styky. Nejznámější z umělých jazyků je esperanto, jediný z jazyků tohoto druhu, jenž se značně rozšířil. Po krátké zmínce o sedmdesátileté historii esperanta přednášející zdůraznil, že již A. Meje správně poukázal na bezpředmětnost sporů o možnosti vytvořit umělý jazyk, poněvadž takový jazyk /esperanto/ už existuje a slouží k dorozumění. E. A. Bokarev dále uvedl konkrétní údaje o současné rozšířenosti esperanta, o různých esperantských vydáních a předvedl ukázky z periodické, monografické, překladové /politické, vědecké a beletristické/ i originální literatury v esperantu.

Při zodpovídání četných otázek vysvětlil přednášející i příčiny, proč esperanto zvítězilo v soutěži s ostatními projekty pomocného mezinárodního jazyka /jako byly ido, novial, occidental aj./, zmínil se o používání esperanta v světovém mírovém hnutí a citoval některá data o nákladech esperantských vydání.

#### **Praha-ek-1956-44-04**

BULTENO PRAHA 44 1956

- 4 -

Po přednášce vystoupil v diskusi ředitel ústavu pro jazykozpyt při AV SSSR doktor filologických věd V. I. Borkovskij, dlouholetí vědečtí spolupracovníci K. E. Martinskaja, L. I. Žirkov, B. V. Gernung, A. A. Reformatskij, M. M. Guchman a docent leningradské státní univerzity N. D. Andrejev. Diskutující zhodnotili kladně přednášku E. A. Bokareva, poukazovali na praktickou hodnotu esperanta a na nutnost věnovat veškerou pozornost otázce jeho probádání. V příspěvcích byla zdůrazňována snadnost ovládnutí esperanta, výrazové možnosti tohoto jazyka, současně však byly vyslovovány pochybnosti o tom, zda je účelné rozvíjet v esperantu původní beletristickou literaturu. V jednom příspěvku byl vyjádřen názor, že je zapotřebí oddělovat otázku naprosté užitečnosti esperanta v naší době od všeobecného problému pomocného mezinárodního jazyka v budoucnosti, kdy na místě esperanta, jako produktu indoevropského jazykového prostředí, bude musit nastoupit jiný pomocný jazyk, jenž bude přihlížet i k etymologii asijských jazyků. Zvláště byla zdůrazněna nutnost probádat esperanto teoreticky i jeho význam jako kolektivního lingvistického pokusu.

Výsledkem diskuse k přednášce bylo, že sekce se usnesla vyslechnout na jednom z nejbližších zasedání druhou přednášku E. A. Bokareva, jež bude věnována esperantu jako předmětu lingvistického bádání.

V. P. Grigorjev

Pozn.: V jednom z nejbližších čísel chce redakce časopisu „Voprosy jazykoznanija“ otisknout stať věnovanou problému pomocného mezinárodního jazyka. Poněvadž má nedostatek současné periodické i monografické literatury týkající se tohoto problému a zejména otázek rozšíření, používání a vyučování esperanta, redakce se obrací na všechny zainteresované organizace, autory jednotlivých děl a redakce esperantských i jiných časopisů s prosbou, aby jí tuto literaturu poslali. Adresa: Redakce časopisu „Voprosy jazykoznanija“, ul. Kujbyševa 8, Moskva, SSSR.

(přeložil z ruského originálu ve 4. čísle z července-srpna 1956 čp. „Voprosy jazykoznanija“, str. 158/9, Josef Staněk, Novinářský studijní ústav, Praha XII., Stalinova 3.)

-----

RENKONTIĜO KUN SOVETIAJ ESPERANTISTOJ. La 30-an de oktobro per vespera rapidvagonaro mi forveturis el Praha al Moskvo. La vojaĝo estis tre interesa kaj la impresoj vere multaj, sed mi volas rakonti sole pri esperantistaj travivaĵoj. – Tuj la unuan tagon en Moskvo, vane serĉante vojon al Koncerta halo de Ĉajkovskij, mi kompreneble fuŝ-ruse demandis viron kiamaniere mi kun miaj du kamaradoj povas atingi la celon. Ne necesas priskribi mian surprizon, kiam la demandito respondis al mi en korekta Esperanto. Tiel mi konatiĝis kun verkisto s-ano Johano Sergeev, kiu bone konis la ceterajn esperantistojn, kie adresojn mi kunhavis.

Interŝanĝo de la telefonnumeroj kaŭzis, ke tuj la venontan tagon telefonis al mi la aktoro de Komsomola-Lenin-teatro, s-ano Nikolaj Ryjtkov, kiu min poste vizitis en la hotelo kaj proponis al mi ĉiusepan helpon.

Dum nia unusemajna restado en Moskvo, mi kaj speciale miaj du amikoj-neesperantistoj plene konvinkiĝis pri la praktika utileco de Esperanto, ĉar dank'al vasta telefonreto mi ofte telefonis al miaj esperanto-amikoj por peti informojn, kaj ili nin ĉiam tre afable helpis.

Ĵaŭde, la 8-an de novembro invitis min s-ano Sergeev en sian hejmon, kie kunestis krom lia edzino kaj filino, s-ano Ryjtkov, s-ano profesoro doktoro Eugen Alexej Bokarev, s-ano Nikolaj Dunovskij el

redakcio de Pravda kaj s-ano Gusev. Ili ĉiuj parolis flue perfektan Esperanton. Dum la virinoj nin riĉe regalis kun vere sole rusa supovo, ni manĝis, babilis kaj kompreneble tostis je ĉio ajn.

Kiam la samideanoj komencis min demandi pri E-movado en nia lando, mi devis konfesi, ke kaŭze de mia kvinjara izoliĝo ili estas pli bone informitaj el mi mem. Tre scivolemaj ili estis pri la kaŭzoj de la malsukceso aranĝi en Olomouc la Tutŝtatan E-konferencon kaj multon ni diskurs pri la opinio de s-ano Burla el Plzeň, kiu supozas ke ĉeĥoslovakaj aŭtoritatoj atenda la decidon pri Esperanto en Sovetunio.

## **Praha-ek-1956-44-05**

BULTENO PRAHA 44 1956

- 5 -

Ankaŭ pri ĉeĥoslovakaj esperantistoj ili deziris multon scii. Poste ili rakontis al mi pri la E-movado en Sovetunio. Ili plendis, ke mankas la Asocio, gazeto, ke ili havas nesufiĉan kvanton da lernolibroj, kvankam la intereso pri Esperanto senĉese kreskas. S-ano Dro Bokarev rakontis, ke tre ofte okazas, ke li estas telefone vokata de esperantistoj el aliaj urboj, kiu postulas informojn, lernolibrojn, vortarojn ktp. Pro la granda intereso ili devis pretigi ciklostilan poŝvortareton. Nova ampleksa vrotaro kaj lernolibro estas preparitaj por la preso. Multaj gazetoj kaj ĵurnaloj skribas favore pri Esperanto. En Moskvo estas samtempe kelkaj kursoj por komencantoj en uzinoj aŭ en lernejoj. Ankaŭ en la universitato de Lomonosov estas du kursoj. Speciale ili petis nin prizorgi korespondantojn por du lernejoj, kies adresoj estas ĉe la fino de la raporto.

S-ano Gusev informis min pri la intervjuo en Esperanto de ĉina s-ano Hujuz en la rondo de sovetiaj ĵurnalistoj kaj pri la sukceso de tiu propagando. S-ano Sergeev posedas sufiĉe ampleksan E-bibliotekon kaj ili ĉiuj penas ĉiamaniere akiri novajn verkaĵojn en Esperanto – kun sukceso. Nur la insignojn ili ne havas, sole la donacitajn de la fremdlandanoj. Tro vasta estas la Esp. movado en Kiev kaj Leningrad kaj ili petis min transdoni peto al ĉiuj ĉeĥoslovakaj esperantistaj turistoj veturontaj al Sovetunio, ke ili nepre kontaktiĝu kun sovetiaj esperantistoj. Mi devas konstati, ke niaj samideanoj en Sovetunio estas tre bone informitaj pri la movado en tutmondo kaj ke ili estas rilate la estontecon de Esperanto tre optimismaj. Ankaŭ prelegon sur gramofondisko de Dro I. Lapenna pri la problemoj de internacia lingvo ni aŭskultis. Dum la vespero s-anoj Ryjtkov kaj Gusev deklamis kelkajn novajn Esp. poemojn kaj ankaŭ siajn proprajn verkaĵojn.

Tre sincere estis la adiaŭado kun multaj esperoj je la revido – laŭ ili – en Ĉeĥoslovakio, kaj mi certe esprimas la vortojn de ni ĉiuj: „Sinceran bonvenon!“

Frant. Patera, Hořice v Podkrk.

Adresoj de la korespondemaj lernejoj:

Srednaja ŝkola 43, Per Ostrovskego 7, 9-a klaso, E-rondo Kolobanova Juna.

Srednaja ŝkola 172, ul. Ĉeĥova 20, 9-a klaso, E-rondo, Madja Hoves

Moskva, SSSR.

-----

SOLENA VESPERO HUNGARA - ĈEĤOSLOVAKA EN PRAHA.

La 22-an de oktobro festis la praga Klubo vesperon honore al gastoj el Hungario; neatendite fariĝis la renkonto unuaranga manifesto i n t e r n a c i a : anoncis sin plurnombra delegitaro bulgara sub gvido de s-ano Georgi Dolapĉiev, prezidanto de BEA, venis reprezentantino de Kroata Esperanto-Ligo, s-anino Lucija Borĉić, Pollandon reprezentis s-anino Gniazdowska. El Hungario venis s-anoj Julio Baghy, prezidanto de HEK kaj Márton Lajos, sekretario de HEK, el fora Ĉinio alflugis s-ano Yeh Ĉun Ĉjen, redaktoro kaj verkisto pekina. Solenan oficialon de la vespero altigis per sia ĉeesto k-do Bázi Antal, kultur-ataŝeo de la hungara ambasadoro en Praha. La ceteraj membroj de la delegitaroj estis: Assen Grigorov el Sofia /kiel ĉiuj bulgaraj gastoj/, ĵurnalisto, Ivan Keremedĉiev, redaktoro, Lujben Grozdanov, teknikisto, Cveta Stamenova, Stefa Kristova, Bojan Sokolve kaj J. Sári el Budapeŝto.

Post la enkondukaj vortoj de l' direktorko de „Osvětová Beseda“ k-do Stanislav Filipín kun preta traduko de s-ano Josef Vítek, kaj la bonvenigo de la kluba prezidanto Jaroslav Šustr la gastoj estis

prezentitaj al la publiko. Ekflagris salutoj en vige viva Esperanto, kaj estiĝis varma atmosfero de amikeco tipe esperantista, tia kiam oni apenaŭ povas renkonti en ia ajn alia medio; vera festeno de internacia interkompreniĝo nepra.

La riĉa programo montris sin inda je la okazo: „Verda Ĉaro“ prezentis la 4-an akton de „Pygmalion“ en brilflua lingvo, por montri almenaŭ specimenon el sia riĉa repertuaro teatra. D-ro Pravoslav Sádlo-Páv delikate ludis elekton el sia violonĉelo-programo solista, kaj la ŝatata gasto Julio Baghy deklamis kun sia nekompareble verva temperamente poemou el sia ampleksa originala verkaro; tondra aplaŭdo denove atestis la popularecon, kiun ĝuas la emitenta poeto kaj dramverkisto ĉe la Espa publiko.

La dua parto de la programo estis dediĉita al film-felietonoj, kiujn alportis la budapeŝtaj gastoj. La unua filmo traktis en tre interesa maniero kaj bonega reĝisorado la problemon de arta konservo kaj savo de valoraj antikvaj artpentraĵoj, la dua filmo aminde prezentis la vivon kaj edukon de la hungara junularo en pionirorganizoj; ĝi estis kolora. Ambaŭ filmoj havis vortakompanion en bonega Esperanto, parolata de L. Totsche kaj J. Baghy; ne temis pri filmaj amatoraj, sed fake faritaj de ŝtata entrepreno, kies serioza intenco permesis atingi artnivelon pli altan ol ĉe la kutime vidataj propagand-filmoj. Kaj por la hungara kulturo kaj por Esperanto ĝi estas valora atingo el vidpunkto propaganda, kaj oni ne povas deteni sin de la deziro ĝui similan felietonon kun Espa akompano en kinejoj ĉiam ajn. La sukceso de la entrepreno estis de grandioza, kaj malgraŭ la malfruta horo la publiko apenaŭ estis sukcesinta disiĝi; la plej persistemaj daŭrigis la festenon en amikaj interparoloj ĝis profunda nokto en la proksima kafejo.

Ŝtefo.

---

IMITINDA EKZEMPLO. Dumvojaĝe al nacia kongreso de polaj esperantistoj haltis per kelkaj tagoj en Praha bulgaraj ĵurnalistoj Ivan Keremédĉiev kaj Assen Grigorov. Ĉe tiu okazo ili vizitis la Socion de ĉeĥoslovakaj ĵurnalistoj kaj la ministran por ŝtata kontrolo, kie oni pritraktis fakajn aferojn kiel ekz. eldonadon je uzinaj kaj vilaĝanaj gazetoj, de bulteno je MŠK ktp.

Krom tio ambaŭ informis prahaajn reprezentantojn de Internacia ĵurnalista organizo en Opletalstrato n-ro 5, Praha II, pri renovigo de TEĴA kaj oni almenaŭ provizore parolis pri ebla reciproka kunlaboro. / IĴO eldonas gazeton „Demokrata ĵurnalisto“ aperantan en angla, franca, germana, hispana kaj rusa lingvoj. / Je ĉiuj tri okazoj bulgaraj samideanoj postulis Esperantiston kiel interpretiston kaj mirigis ĉs. oficialulojn pro bonegaj kvalitoj de nia interkomprenilo. Rekomendinda ekzemplo!

stk

---

KARAJ GEAMIKOJ!

Praha, la 25-an de oktobro 1956

Hodiaŭ mi forveturas al Varsovio kaj pere de tiu ĉi letereto adiaŭas vin – ĉiujn geamikojn en Ĉeĥoslovakio. Mi volas diri al vi, ke mia restado en via lando estis ĝojega kaj certe mi tion ankaŭ rakontos al miaj samlandanoj kiam mi revenos al Ĉinio.

Kun elkoraj salutoj via

Yeh Ĉun Ĉjen

---

AL TKKE en Ĉeĥoslovakio!

Peking, la 9-an de novembro 1956

Samideano Yeh Ĉun Ĉjen revenis la 6-an de kuranta monato el Pollando. Li informis nin pri via gastama akcepto kaj pri viaj grandaj sukcesoj en propagando kaj edukado de Esperanto. Tio donas al ni grandegan instigon... Same kiel vi, ni kredas, ke dank' al viaj fruktodonaj klopodadoj via tutŝtata kongreso de esperantistoj tamen baldaŭ efektiviĝos kaj rikoltos granda sukceson! Sincere ni vin ĉiujn salutas!

Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 77, Peking, Ĉinio

---

Nur nun ni informas niajn membrojn kaj amikojn pri la s e s d e k - jariĝo de nia meritplena longjara membro František BUHR /la 30-an de aŭgusto 1956/ el Praha. Kvankam malfrue, la komitato de EKP kaj la redakcio de la Bulteno esprimas al nia ŝatata ano siajn sincerajn bondezirojn de firma sano kaj vivoptimismo por la venontaj jardekoj!

---

GRAVA SCIIGO!

Marde la 27-an de novembro 1956 la radio Praha disaŭdigis esperantlingve arion el nia fama opero „Najado“ de Dvořák. TKKE sendis al la stacio sian dankleteron /rekomendas same fari al la legantoj!/ kun la peto pri proksima programo en Esperanto informi nin ĝustatempe.

- - -



INTERNACIA TAGO DE INFANOJ.

Esperanto-rondeto ĉe zjara mezlernejo en Dolní Bludovice en novembro festis sian unujaran vere prosperan ekziston. Gvidas ĝin entuziasma instruisto de gimnastiko s-ano Oldřich Schwetter. Dum la Internacia Tago de Infanoj la 1-an de junio 1956 tiu ĉi rondeto organizis kun tre granda sukceso vere internacian atletikan konkurson de la infanoj inter tiuj ĉi lernejoj:

Temple Boys' School, Rochester, Anglujo,  
Pestalozzische Schule, Freital, Pestalozzist.2, Germana dem. respubliko,  
Pécs-Gyárvárosi állami általános škola, Pécs, Puskin-tér 1, Hungario,  
Ormosbányai állami általános škola, Ormosbánya, Hungario,  
Lernejo Nguyen Trai Hanoi, Vietnamia popola respubliko,  
Knabina Liceo Trung, Vuong, Hanoi, Vietnamia popola respubliko,  
lernejo Chu Vam An, Hanoi, Vietnamia popola respubliko,  
lernejo Nguyen gia Thieu, Hanoi, Vietnamia popola respubliko,  
lernejo Pho Thong Cap 3, Hanoi, Vietnamia popola respubliko,  
Osmiletá střední škola Klem. Gottwalda, Dolní Bludovice, Ĉeĥoslovakio,  
Hsin Hu mezlernejo, Shanghai, Ĉinio./

Atletiko konkursis entute 120 gelernantoj de la nomitaj lernejoj /46 knabinoj kaj 74 knaboj/. En ĉiuj konkursaj lokoj estas la konkursoj aranĝitaj vere solene. Ekz. la raporto el Hanoi: „Hodiaŭ, la 3-an de junio, ni eniras la stadionon antaŭ miloj da niaj gekamaradoj, pensante je la Internacia infana tago, je via varma amikeca, je nia devo batali por la renovigo de nia kara patrolando Vietnamio. Ni estas entuziasmaj kaj ĝojplene partoprenantaj la konkurson, kontribuante tiamaniere la plifortigon de la interpopola amikeco kaj la plifirmigon de la mondopaco. En plenĝoja atmosfero honore al la Internacia tago de infanoj, ni organizas sportkonkurson en la Urba Stadiono en Hanoi. Post la revumarŝo de 1500 pioniroj sekvas konkurso de 50 geknaboj el lernejoj meze de tondra aplaŭdo de 5000 etaj ĉeestantoj. Laŭ la atingitaj rezultoj la unuaj tri lernejoj estis: 1. Anglujo, Hungario /Pécs/ kaj Germana demokrata respubliko La kvara estis la lernejo ĉeĥoslovaka. En la konkurso de unuopuloj la unua estis la Levanto W. Dressler en GDR /202 poentoj/, sekvas anglaj lernantoj, sepa estas hungara Cs. Pinchelyi kaj la oka ĉeĥoslovaka J. Kulhánek. En la kuro je distanco de 60 metroj la plej bona tempo estis 8,2 sekundoj, en longsalto de knaboj 475 cm, kriketpilketo-knaboj 68,09 m. El knabinoj G. Lehman el GDR atingis 215 poentojn. Kuro 60m tempo 8,9 sek., longsalto 420 cm, kriketpilko 48,77 m.

Dum la konkursoj en la stadiono flirtis ankaŭ la Esperanto-flago, ĉar estis nur la Internacia lingvo, kiu eminente servis kiel interkomprenilo dum tiu-ĉi elstara nobla grandskala entrepreno.

---

!!!BELEGAJN GLUMARKOJ EN KVAR KOLOROJ – 100 pecojn po ??? Kĉs mendu ĉe s-ano Fr. Pytloun, Jungmannova 29/I., Poděbrady, kie vi povas ankaŭ mendi la Bultenon de Asocio de Esperantistoj en Pollando.

---

POLAJ ESPERANTISTOJ. Sub tiu ĉi aperis la 27-an de oktobro en tagĵurnalo „Życie Warszawy“ artikolo okaze de la 13-a Tutpola esperantista kongreso, kiu efektiviĝis post zjara interrompo. La plej granda parto de la artikolo estas dediĉita al la historio, gramatiko kaj vortkreado en Esperanto. Estas konstanta la renovigo de esp. movado en Polujo de post la lasta Varsovia festivalo de Monda junulara federacio. Krom tio speciale estas menciitaj la jam reeldonitaj kaj eldonataj esp. publikaĵoj, inter ili verkoj de A. Mickiewicz, B. Prus, M. Jastrum, M. Orzeszkowa kaj J. Tuwim. El avantaĝoj de Esperanto oni substrekas: simpligitan gramatikon /ties 16 senesceptajn regulojn/, fonetikan skribadon, genian sistemon de afiksoj kaj sufiksoj kaj deklinacion.

lomete ironie sonas la konstanto, ke dum antaŭ la dua mondmilito polaj esperantistoj estis suspektataj el simpatioj al komunismo, post la jaro 1948 oni konsideris Esperanton kiel burĝaran postvivaĵon. Ankoraŭ pli venenema estas la rimarko, ke io simila ovas okazi nur se pri lingvaj problemoj decidas politikistoj kaj ne ligvistoj. Je fino esprimas la aŭtoro W. Włodarczyk esperon, ke verŝajne Esperanto estos laterite ŝatata ĝuste en ĉi Polujo, kiu ĝin donis al la homaro.

stk

---

## **Praha-ek-1956-44-08**

BULTENO PRAHA 44 1956

- 8 -

La prezidanto de EKP s-ano Jaroslav Šustr prelegvizitis la 6-an de novembro la Klubon en Brno, kie li prezentis al plena salono malmulte konatan historion el tempo de Komenský sub titolo Alberto Borowski.

---

NIA MEMBRO OTA GINZ, nun en Izraelo, petas denove la skribintojn pri senkulpigo pro sia nerispondado. Li ricevas ĉiusemajne amason da leteroj, inter ili ĉiam multaj el Ĉeĥoslovakio kaj en plejparto de ili li estas petata pri sendo aŭ interŝanĝo de poŝtmarkoj kaj aliaj objektoj. Oni skribas en la leteroj: „Ni legis vian anoncon, ke vi estas filatelisto, ke vi volas interŝanĝi poŝtmarkojn...“ k.s. Temas pri eraro, ĉar neniam kaj nenie aperis simila anonco. Ĉiuj akceptu sinceran saluton de s-ano Ginz, kiu bedaŭras, ke li kapablas pesone danki ilin. Specialan dankon li sendas al la multnombraj amikoj, kiuj gratulis lin okaze de lia 60-a naskiĝtago.

---

ĈEFRABENO DE PRAHA – ESPERANTISTO. Dro Gustav Sicher, ĉefrabeno de ĉeĥaj landoj, fama scienculo, kiu atingis antaŭ nelonge sian 75-an jaron, estas esperantisto. Antaŭ jaroj li estis aktiva UEA-delegito en Náchod.

O. G.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO eldonas ĉiujare valoran jarlibron /en du partoj/ kun pli ol 300 paĝoj. En ĝi troviĝas adresoj de pli ol 2000 delegitoj de ĉiuj mondpartoj, informoj pri UEA, pri Landaj Asocioj, pri Fakaj Asocioj, Akademio de Esperanto, kongresoj, gazetoj, libroj, ktp. UEA eldonas ĉiumonate la revuon „Esperanto“ kun interesa enhavo, kulturklerigaj artikoloj, literaturaĵoj, novaĵoj el Esperanto-Movado, recenzoj de libroj, distraĵoj, ilustraĵoj. – UEA per sia reto de delegitoj kaj fakdelegitoj donas al siaj membroj unikan servon tra la tuta mondo. FARIĜU MEMBRO DE UEA! La kotizoj por 1957: MJ /membro jarlibro/ Kčs 25,-, MA /membro abonanto /Kčs 50,-, MS /membro subtenanto/ Kčs 75,-. Junularo ĝis 21a jaro pagas duonan kortizon. Postulu aliĝilon de Teritoria oficejo de UEA en Praha: Jaroslav Šustr, Praha I., Dlouhá 10. Malnovaj membroj renovigu vian membrecon por la jaro 1957 laŭeble antaŭ la jarfino de 1956.

---

SKRIBMAŜINO SERĈATA. Por bulgara samideano mi serĉas malpli novan, ne tro multekostan sed ankaŭ ne difektitan skribmaŝinon. Prefere kun franca „accent circonflexe“ por skribi nian supersignitajn literojn. Eblaj oficialaj kaj portebaj tipoj. Anoncojn afable al: Joĉjo Staněk, ĵurnalisto, Spojovací 16, Praha IX.

---

TELEGRAFA AGENTEJO UZOS ESPERANTON. Bulgara telegrafa agentejo BTA intencas eldonadi de post januaro 1957 ĉiumonate tridekdupaĝan bultenon en Esperanto.

---

EL LA LETERO DE ĜENERALA SEKRETARIO DE UEA PROF. D-RO IVO LAPENNA /la 21.XI./: „Mi bedaŭras, ke la konferenco en Olomouc ne povis okazi. Se ĝi estus okazinta, ĝi estus estinta unu el la plej brilaj aranĝoj de la Esperanto-Movado en la lasta tempo. Nu, kio ne estis, povas esti. Mi ne perdas la esperon, ke iam okazos aŭ en Olomouc aŭ en iu alia urbo tia konferenco. Mi ankaŭ ne perdas la

esperon, ke iam mi povos ĉeesti ĝuste tian kunvenon de esperantistoj. Kvankam la situacio konsiderinde malboniĝis en la lastaj semajnoj, mi tamen estas konvinkita, ke ne okazos milito. Mi eĉ profunde kredas, ke ĉio evoluos tiel, ke baldaŭ vi povos havi en Ĉeĥoslovakio oficialan bone organizitan movadon, same kiel tion atingis niaj geamikoj en Pollando.“

---

MUTA BARIKADO EN ĈINA LINGVO. „Muta barikado“, fama verko de Jan Drda, aperis en ĉina lingvo. La tradukon preparis ĉina esperantisto Li-Laojon laŭ Esperanto-manuskripto. Laŭ la sama teksto estis la verko tradukita ankaŭ en lingvon japanan fare de Tugu Kurisu.

O. G.

---

### **Praha-ek-1956-44-09**

BULTENO PRAHA 44 1956

- 9 -

HEROLDO DE ESPERANTO. Legantoj kaj abonantoj de ĉi tiu bela gazeto ne ricevis la numeron 15. Laŭ la informo ricevita el Nederlando, resendis ĉeĥoslovaka poŝto sendaĵon de tiu numero sen ia klarigo. Ĉar la 16-a numero venis kaj estis dissendita tute normale, ni kredas, post ia tempo ricevi ankaŭ tiun numeron. En nuna momento, kiam estas presata ĉi tiu numero de nia BULTENO, ni ne havas ankoraŭ informojn, kiamaniere estos Heroldo distribuata en la jaro 1957. Tiun klarigon ni atendas nur fine de la semajno. Ĉar ne estas eble atendi kun la eldono de ĉi tiu numero de Bulteno ĝis ni ricevos la informojn, ni simple aranĝos la aferon tiel, ke ni sendos nian pagilon al tiuj, kiuj Heroldon jam ĉe ni mendis, aŭ ankoraŭ mendos, supozante, ke ne okazos grandaj ŝanĝoj kaj ke nombro de ricevotaj numeroj estos sufiĉa.

---

NORDA PRISMO abongebla pere de nia Klubo. Jara abono Kĉs 22,--  
NICA LITERATURA REVUO..... Jara abono Kĉs 10,--

---

PRI NIA LANDO EN JAPANIO. „Infanoj de la mondo“, 16-voluma geografio de la tuta mondo, verkita de infanoj, eldonis nun volumon orienteŭropan, kie grandan parton okupas priskribo de Ĉeĥoslovakio kaj de ĝia vivo. La materialon liveris niaj infanoj, por celoj de la eldonejo ĝi estis tradukita en Esperanton, kiu prizorgis pluan tradukon en lingvon japanan.

O. G.

---

ESPERANTO HLEPIS EN ĈINA TRADUKO DE „ŜVEJK“. Alvenis ĉina traduko de la fama verko „Ŝvejk“ de Jaroslav Hašek. La eldonon efike subtenis ĉeĥaj esperantistoj, speciale antaŭparolo por ĉinlingva eldono estis tradukita el Esperanto.

O. G.

---

HENRI BARBUSSE estis honora prezidanto de la Universala Kongreso 1921 en Praha. Al tiu ĉi UK li sendis sian leteron. La letero estis publikigita en L' Humanité (19.VII.1921) sub titolo HENRI BARBUSSE ET L' ESPERANTO. AKADEMIO DE SCIENCOJ (kabinet opor moderna filologio) disponigis al ni la kopion de tiu ĉi letero (en franca lingvo). Sciencaj interesuloj povas ĝin pruntricevi de la prezidanto de TKKE. Same el tiu ĉi fonto ni havas ROMAIN ROLLAND ET L' ESPERANTO (publikigita en L' Humanité 12.VIII.1922).

---

JUBILEO DE UNESKO. Nia alvoko en la pasinta numero postlasis eksterordinaran eĥon kaj ni kun granda ĝojo konstatas, ke preskaŭ ĉiuj esperantistaj medioj en Ĉeĥoslovakio prelegis komence de novembro je la supra temo. Pluraj esperantistoj faris prelegojn en siaj uzinaj kluboj, fabrikoj, laborejoj. TKKE sendis la saluttelegramon al la konferenco en New Delhi, esperantistoj el diversaj lokoj aerpoŝte sendis siajn salutleterojn. Sincerajn kaj korajn dankojn!

Josef Vitek

---

NIA REDAKCIO RICEVIS NOVAJN DU LASTAJN S T A F E T O - LIBROJN de la redaktoro s-ano J. Régulo Pérez. La recenzo pri tiuj ĉi bonegaj libroj aperos en nia proksima numero de Bulteno.

---

LAŬ NIAJ LASTAJ INFORMOJ niaj karaj amikoj Julio Baghy kaj Márton Lajos troviĝas ankoraŭ en Varsovio, kio ili partoprenis la landan kongreson de polaj esperantistoj kiel oficialaj delegitoj de HEK. Kun Hungarlandoni ankoraŭ ne havas kontakton, tial ni ne povas informi niajn legantojn, kiuj de ni deziras la informojn.

---

NIAJ GEAMIKOJ EN SOVETUNIO. Preskaŭ ĉiutage en la poŝto ni trovas plurajn leterojn aŭ poŝtkartojn de tiuj ĉi niaj geamikoj. En ĉiuj ni ĝoje legas, ke la movado konsiderinde kreska, kvankam ekzistas provizore certaj teknikaj malfacilaĵoj, kiel ni informas en la raporto de s-ano Patera. Speciale utilaj por ni estas la gazetoj kaj ĵurnaloj, kiuj publikigas ofte neimageble por ni longajn artikolojn pri Esperanto. Laŭ niaj eblecoj ni plenumos la dezirojn de niaj amikoj pri alsendo de nia Bulteno ĝis ni havos tutŝtatan presorganon. Volonte ni ankaŭ hlepus per insignoj, sed kelkcentojn ni sendis en aliajn landojn kaj nia provizo plene elĉerpiĝis. Daŭros kelkajn monatojn ĝis ili denove en sufiĉa kvanto estos haveblaj.

---

#### **Praha-ek-1956-44-10**

BULTENO PRAHA 44 1956

- 10 -

Ĉar ni nepovis ĝustatempe finpretigi la kapeton „TKKE INFORMAS“, pluraj informoj aperas sur la paĝoj de nia Bulteno sen speciala rimarko.

GRAVA SCIIGO! Laŭ niaj lastsemajnaj informoj la afero de nia tutŝtata organizo estas serioze priŝtata denove kaj estas senduba espero, ke baldaŭ ĝi estos favore por ni decidita. Ni estu paciencaj kaj eniru la novjaron kun bonaj esperoj pri hela esperantista perspektivo. Ni scias, ke momente la poresperanta situacio ekz. en Plzeň, Bratislava aŭ Děčín estas malfavora, sed ni venkis siatempe en Poprad kaj nuntempe en Most kaj Litvínov kaj certe ankaŭ en tiuj ĉi lokoj denove floras la movado, kiel ĝi floras en vere jam multaj urboj. Novaj rondetoj estas ankaŭ fonditaj en Gottwaldov I ĉe ZK ROH Svit, en Havířov kaj en Poruba. En du monatoj 5 rondetoj estas certe promesa fakto! Karaj gesamideanoj! Mi estas certa, ke post malvarma vintro ni bonvenigos ne nur belan printempon, sed ankaŭ nian konferencon en Olomouc, kies aranĝon ni gardas unuavice!

Josef Vítek

---

BELE ARANĜITAJN EKSPozICIOJN DE ESPERANTAĴOJ prizorgis niaj fidelaj kunlaboratoj en Karlovy Vary kaj en Gottwaldov. Gratulon al ili!

---

STARÝ SMOKOVEC, DOLNÍ BLUDOVICE, pluraj lokoj en OSTRAVA (inter ili lernejoj laŭ specialaj deziroj de la lernejdirektoroj-neesperantistoj), Děčín, Litoměřice, Svitavy, Karlovy Vary, Písek – anonas novajn kursojn de Internacia lingvo. Ili akceptu niajn dankesprimojn. Speciale interesa estas la raporto de s-ano Oldřich Schwetter el Dolní Bludovice, en kiu ni legas: „Komence de novembro 1955 mi fondis en nia lernejo interesrondeton pri Esperanto kaj tuj ekfunkciis elementa kurso kun 30 gelernantoj (11-14 jaraĝaj). Direktoro de la lernejo kaj geinstruistoj montris komprenon por mia laboro kaj precipe la spatra kunularo, kiu donis al nia rondeto 300 Kčs. Tiun monsumon mi uzis komence de januaro 1956 por vizito de la konferenco en Olomouc, kiun partoprenis 3 knaboj, 3 knabinoj kaj mi mem. Februare 1956 nia rondeto helpis al nia instruistino de rusa lingvo, kiam ŝi vane helpe de rusa lingvo serĉis taŭgan rusan lernejon por korespondi ruslingve inter lernejoj. Ni helpe de Esperanto trovis ne unu, sed tuj kvin lernejojn. Tiel ni denove montris al kelkaj nekredemuloj, kiel kapabla kaj necesa estas la Internacia Lingvo. Okaze de Internacia Tago de Infanoj nia rondeto ebligis

entrepreni grandan atletikan konkurson je malproksimo inter naŭ lernejoj (vidu specialan raporton sur la 7-a paĝo!). Merkrede la 17-an de oktobro mi komencis novan kurson en nia lernejo. Kvankam aliĝis 49 gelernantoj mi ne akceptis ĉiujn kaj mi elektis sole 28 gelernantojn, kiujn apartenas al la plej bonaj gelernantoj de nia lernejo. La aliajn mi ne povis akcepti, ĉar ili ne plenumas bone siajn lerneajn devojn. En la plej juna urbo de nia respubliko Havířov ĉe Kleriga Kunularo estis fondita nova rondeto sub mia gvido. Fine de oktobro ni preparas ekspozicion kaj komence de novembro elementan kurson. Granda montrofenestro allogis jam kelkajn gelernantojn por la kurso“.

- - -

Sabate la 1-an de decembro estis aranĝita de la Junularo de la EKP jam la tradicia Nikolaa vespero kun varia programo. Dimanĉe la konferenco venigis pli ol 50 junajn esperantistojn el 14 lokoj de Bohemio kaj Moravio. Detalan raporton ni ne ricevis.

- -

REGIONAN KONFERENCON DE REGIONOJ OLOMOUC-OSTRAVA en Místek la 9-an de decembro partoprenos ankaŭ la prezidanto de TKKE s-ano Josef Vítek, kiu samtempe reprezentas nian EKP. Li restos en Silezio tutan semajnon por pli ol 20-foje prelegi en diversaj sileziaj urboj.

- -

Korespondi deziras: s-ano Vlasta Balcar el Česká Skalice, Jiráskova 504, ĈSR.  
Interŝanĝo de pm. kaj pk.dezirata.  
Pighini Mauro, Via Vignaleta 1, MASSA /Massa Corrona/ Italio, kun esperantistoj de 14-20 jaroj.

-----  
BULTENO, informilo de Esperantista Klubo ĉe OB2 en Praha, aperas laŭbezone.

Respondeca redaktoro: Josef Vítek, Jungmannova 24/I. Praha II./tel. 238323/

Koresponda adreso: Jaroslav Šustr, prezidanto de EKP, Dlouhá 10, Praha I. /63464